

Christian Winther,

## Ripozo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Foras la suno, la tago forplonĝas,  
staras la nuboj jen ĉe l' ĉiel-rand',  
lumas la steloj; dormetas kaj sonĝas  
en trankvilego la mar' kaj la land'.

Aĥ, se mi povus, nun kiam finiĝos  
mia viv-tago, - samkiel jen flor' -  
turni kun fido, ĝis ree tagiĝos,  
min al la juna matena aŭror'!

*Traduko de la Dana poemo "Hvile" de CHRISTIAN WINTHER (Kristiano Vintero, \*1796 - †1876) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984-10.04.*

*MR-158-3 / Arg-244-494 (2004-06-10 11:11:55)*